

227 E 9 (4) "1914/18"

Nova Esperanto-Biblioteko

Noj 3-4

60 Pf.

La granda mensogo

Traduko de la angla broŝuro
„Tsardom's part in the war“
de E. D. Morel




Eldonita de
Deutscher Esperanto-Dienst
(Germana Esperanto-Servo)



Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin S 59

✓ Morel, E(dmund-)D(ene)

Nova Esperanto-Biblioteko



Noj 3-4

La granda mensogo

Traduko de la angla broŝuro
„Tsardom's part in the war“

de E. D. Morel



Eldonita de
Deutscher Esperanto-Dienst
(Germana Esperanto - Servo)



1918

Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin S 59

700.347 - A. Esp.

3-4



Enkonduko

En Septembro 1917 *E. D. Morel*, antaŭ la milito konata de la mondo kiel angla laborista gvidanto kaj sentima pioniro por la principoj de la demokratio, de la registaro de Lloyd George estis ĵetata en malliberejon.

Miro iris tra la tuta mondo, tra ĉiuj rondoj, kiuj konis la ne ŝanceblan veramon de E. D. Morel, lian ne dubeblan patriotismon, lian konstantan pledadon por la demokratiaj principoj.

Kio estis la kaŭzo de tia procedo kontraŭ tia viro? Kio povis instigi la anglan registaron, tiamaniere malrespekti la principojn, pro kiuj ĝi dum jaroj aldevigas al la mondo la plej sangan el ĉiuj militoj, per aresto al viro, kies ne tuŝebla karaktero kaj nobla pensado fariĝis konataj trans la limoj de lia patrolando?

La vera kaŭzo ne longe restis kaŝita.

La „kulpo“ de E. D. Morel konsistis el tio, ke li publikigis malgrandan broŝuron, kiu per insistaj kaj flamaj paroloj pledas por la bono de la

reciproke sin disŝirantaj popoloj de Eŭropo kaj per kiu li ankaŭ ekstere de la limoj de Anglujo volis paroli al la homaro sanganta el mil vundoj.

Tiu broŝuro estis lia krimo. Per ĉiuj rimedoj la nuna angla registaro provis malhelpi ĝian konatigon kaj ĝian disvastigon. Sed spite de ĉiuj despotaj subpremaj antaŭrimedoj de la ĉefpotenculo de l' iama libera Anglujo ĝi fariĝis konata, kaj ni nun komunikas ĝian enhavon al la publiko. La broŝuro titoliĝas: „*Tsardom's part in the war*“. Per koncizaj, frapantaj frazoj ĝi atestas pri la malindulge logika akreco, pri la profunda veramo kaj la ĝenerala homamo de la verkinto, kiu pro tio devis iri en malliberejon.

Ĉiu legu la malgrandan broŝuron, kies konatigon la potenculoj de la angla „demokratio“ ne volis toleri.

Sed ĝi ne nur estas atesto pri la ne koruptebla, vere demokratia sento de sia aŭtoro, sed ankaŭ pri lia vere profeta spirito.

Nome, kion Morel en sia broŝuro elmontras en mallongaj konturoj okaze nur rimarkige kaj preskaŭ per superhoma divenema talento, tion dokumente malkovris kaj al pli granda publikeco montris nur la evoluo de la internpolitikaj cirkonstancoj en Ruslando, la malkovroj de la Suĥomlinov-proceso, la publikigoj de la rusaj-francaj-anglaj-italaj sekretkontraktoj kaj la kune kun tio okazinta telegraminterŝanĝo inter Berlin kaj Wien.

Kion Morel el sia forta homa sento por justeco, el sia vere demokratia pensado kaj el ne kredeble akra enrigardo en la historiajn okazintaĵojn nur antaŭsentante perceptis kaj ekkonis per ne eraranta certeco kiel la definitive puŝantan forton por la eksplodo de la milito, tio nun estas pruvebla el la supre cititaj publikigoj kaj malkovroj kun ne gravaj diferencoj laŭ la historie ne kontesteblaj faktoj. „*Tsardom's part in the war*“ nun ne plu estas nur la brila kombinaĵo de politike kapabla kapo; la danĝera rolo, kiun la carismo kaj liaj koruptitaj incitantoj kaj helpantoj en Ruslando kaj en la Entente-landoj ludis por la malbono de ĉiuj popoloj de Eŭropo, senindulge estas malkovrita per la publikigoj de la registaro de l' rusa popolo liberigita de la carismo.

Tio donas al la broŝuro ĝian apartan gravecon. Pro ĝi la verkinto estis ĵetata en malliberejon, kaj tri monatojn poste ĝi parto post parto historie estas pruvata kiel vera, nome per eldiroj de oficiroj kaj per dokumentoj de politikistoj, kiuj konspiris kun la nunaj juĝistoj de E. D. Morel, de viroj, kiuj estis interligitaj kun la registaro, per kies verdikto la verama buŝo de Morel estu silentigata en malliberejo.

Kaj kio estis la kaŭzo de ĉi tiu procedo?

En la postparolo de sia broŝuro, parolo, kiu estas varma alvoko al la ĝenerala homarsento, en ĉi tiu postparolo, en kiu li okaze parolas ankaŭ pri la angla „*horror of conferring*“, Morel mem

rimarkigas tion. Estas la timo pri la konfeso de iliaj daŭrigataj mensogoj kaj pri la disigo de la nebulo da malveraĵoj, per kiu la nunaj potenculoj de Anglujo vualis la rigardon de sia popolo; estas ilia nekapableco, konfesi la propran blindiĝon, kiu naskis tiun „horror“ kaj restigas la anglan registaron sur la vojo al la abismo.

Anglujo, rifuĝejo de la libereco, lando de la grandeco kaj vasteco! Kie restis la spirito, pro kiu tiel multaj jam kantis pri vi? La atestantoj de vireca sincero, la apostoloj de malnovaj idealoj devas timi ĉe vi, tiel ŝajnas almenaŭ, pro libereco kaj vivo. — —

* * *

La esperantigo de la broŝuro estas farita laŭ germana traduko, ĉar originalon ni bedaŭrinde ne povis ricevi; la sola originala ekzemplero veninta Germanujon, estas konservata de oficiala estraro. Do povas esti, ke la Esperanta teksto ne tute laŭvorte akordiĝas kun la angla, sed laŭsence ĝi sendube fidele redonas la anglan originalon.

En Aŭgusto 1918.

La eldonintoj



Antaŭparolo

Jam jarojn antaŭ la milito mi provis klarigi al miaj samlandanoj, ke la lando iras renkonte al granda danĝero kaj sendube estus implikota en internacian katastrofon pro la sekreta politiko, kiun praktiki nia ministerio por eksteraj aferoj trovis bona.

* * *

Dum la pasintaj tri militjaroj mi konstante atentigis pri tio, ke la respondecon pri la katastrofo, kiu venis super la mondon, oni ne rajtas atribui al unu sola el la militantoj, sed ke pli vere ĉiuj militantoj ĝin havas diversgrade.

Konstante kaj energie mi en ĉi tiuj tri jaroj turnis min al la civila loĝantaro en ĉiuj militantaj landoj, precipe al miaj samlandanoj, al kiuj mi unuavice parolas, ke pli bone ili ekzamenu, kio povis juste esti kritikata je la agadoj de la propra lando, anstataŭ turni sian atenton nur al la malkorektaĵoj de la alia flanko.

Mi faris tion speciale energie, ĉar mi estas konvinkita pri tio, ke ĉe efektivigo de mia konsilo

la milito povus esti mallongigata, anstataŭ esti pli-longigata — kio devas esti la ne evitebla sekvo ĉe la konservado de la lasta metodo.

Miaj klarigoj estis tiel energiaj, ĉar laŭ mia opinio la civila loĝantaro kontraŭe al la batalantaj sampopolanoj havas speciale grandan moralan respondecon; ĝi efikigu sian influon pli je mallongigo ol je plilongigo de ĉiuj teruraj suferoj de la batalantoj sur tero kaj maro.

Mi akcentis ĉi tion tiel forte, ĉar, kontraste al tio, kion oni komence certigis al ni, la milito efektive ne estas milito inter kontraŭstarantaj politikaj idealoj, inter „aŭtokratio“ kaj „demokratio“. Oni nur pripensu unufoje, en kia koalicio ni en realeco komencis la militon! En interligo kun la plej reakcia aŭtokratio de la mondo, kun aŭtokratio makulita per ĉia speco de hontindaĵoj. Ni restis ĝia konfederito kaj submetis al ĝiaj ambiciaj celadoj eĉ niajn naciajn interesojn, ĝis la momento, kiam la tiel longe subpremita popolo levis sin kaj liberigis sin de ĝi. Cetere „demokratio“ estas sensenca nomo por registara sistemo, ĉe kies ekstera politiko oni tute ne povas paroli pri nacia kontrolo. La decidoj de la ekstera politiko de nacio estas decidoj pri vivo kaj morto de la burĝoj. Do, se la nacio ne kontrolas sian eksteran politikon, la „demokratio“ ne povas decidi pri ĝia propra sorto, indiferece, ĉu ĝi havas parlamentan konstitucion, aŭ ĉu reĝo gvidas ĝin. Krome „demokratio“ estas sensenca nomo, se ĝi estas aplikata por plutokratia

regsistemo, ĉe kiu la potenco pri la lando kaj ĝiaj trezoroj troviĝas en proporcie malmultaj manoj kaj sub kiu la vivsituacio de milionoj da burĝoj fakte estas preskaŭ mizera.

La milito estas la plej bona pruvo por la fundamentaj eraroj kaj maljustaĵoj, sur kiuj konstruiĝas nia tuta moderna civilizacio, kaj same la milito estas la rezultato de malnovaj kaj daŭraj kulpoj de ĉiuj civilizitaj registaroj kaj popoloj, indiferente, ĉu temas pri iliaj reciprokaj interrilatoj aŭ pri ilia traktado al naturpopoloj. La ideo, ekstermi tiel profunde radikantajn malbonaĵojn per frakasanta militista triumfo de unu militanto kontraŭ la alia, estas pereiga iluzio. Tia triumfo nur eternigus tiujn malbonaĵojn, ĉar ĝi elmetus la mondon nur al la ripeto de la kaŭzoj elvokintaj tiujn.

* * *

Mia firma konvinko, ke ne unu sola nacio, sed ĉiuj popoloj estas respondigotaj pri la milito, baziĝas sur amaso da faktoj kaj elmontroj, sur eldiroj de eminentaj politikistoj, militistoj kaj ĵurnalistoj el la rondo de niaj konfederitoj. Mi ne kredas, ke mia pruvmaterialo en iu loko efektive estas refutebla. Same kiel la datoj estas ne renverseblaj, tiel ankaŭ rilate al la montritaj de mi citaĵoj neniu povos diri, ke ili ne plej precize estas redonitaj. Miaj libroj kaj broŝuroj en Anglujo kaj en konfederitaj kaj neŭtralaj landoj estas legitaj de dekmi-
loj, spite de la „terura bojkoto per la gazetaro“,

pri kiu Bernard Shaw parolis. Ĉar objektiva kritiko ne povis stariĝi kontraŭ tio, aŭ, kie ĝi estis provata, ĝi ne sukcesis malfortigi la prezentitan de mi pruvmaterialon, oni sufiĉe uzis insultojn. Ĉar per polemiko oni ne povis atingi ion kontraŭ mi, oni provis ekflamigi kontraŭ mi la pasiojn kaj antaŭjuĝojn de la fipopolo, kiu precipe, kvankam ne tute, konsistas el la amaso de la ne inteligenta meza klaso, kiu ankoraŭ ĉiam senkritike akceptas tion, kion la gazetoj publikigas.

Oni nomis min amiko de germanoj kaj germana „agenteo“. Kial ĉi tiuj nomoj por angla verkisto, kiu — kaj en tio mi diferencas de granda nombro da eminentaj reprezentantoj de niaj regantaj klasoj — nek ĝuis germanan gastemon (imperiestran kaj alian), nek havis iajn komercajn aŭ aliajn interrilatojn kun Germanujo? Same malmulte Germanujo iam estis mia „spirita hejmlando“, eduka hejmo aŭ alia hejmo, same malmulte mi kompreneble iam partoprenis en germanaj-anglaj armil-asocioj, kiuj farigas murdinstrumentojn uzatajn nun kun la plej granda senpartieco por buĉado al angloj kaj germanoj. Kaj tio tute krom la fakto, ke la nacia kontrolo pri la ekstera politiko, la decido pri disputata landposedo laŭ la memdestinrajto de iliaj loĝantoj kaj laŭ aliaj principoj, por kiuj mi pledas, estas la antitezo de ĉio tio, kion la „prusa militarismo“ prezentas, kiel entute la antitezo de ĉia speco de militarismo!

* * *

La kaŭzoj, pro kio mi tiel klopodas por la plej grava laŭ mia opinio tezo — nome tiu, ke Germanujo kaj Aŭstrio, kvankam ankaŭ ilia parto de la respondeco pri la milito estu sufiĉe grava, tamen ne solaj estas kulpigeblaj pri ĝia eksplodo kaj ke la riproĉo kontraŭ ili, precipe tiu kontraŭ Germanujo, ke ĝi ekflamigis la militon, por „subigi Eŭropon“, estas perfekta malsaĝaĵo —, estas tre simplaj. Mi efektive ne povas silente rigardi, kiel Britio iras renkonte al sia ruiniĝo, kiu laŭ mia opinio devas okazi, se ĝia militpolitiko ankaŭ plue staras sub la signo de tiaj opinioj.

Mi deziras al la popoloj de Eŭropo, ja al ĉiuj popoloj, post la nuna milito la eblecon, liberigi sin el la ĉenoj de la politika, ekonomia kaj sociala sklaveco, kiu malhelpas ilian tutan evoluadon. Sed laŭ mia opinio ili ne volos kaj povos tion, se ili ne ekkonos, ke la kaŭzo de l' milito estas serĉota ne nur en la krimo de unu aŭ du registaroj, sed en la sistemo, el kiu ĉi tiuj registaroj devenigis sian potencon. Se la popoloj atentis tion, ili persistos pri baldaŭa finigo al la milito sur la vojo de l' interkonsento, kiu sola donas al ili la eblecon, komune agadi por sia emancipo.

La rusa popolo nun estas atinginta ĉi tiun staton de la konvinko. La brita popolo ankoraŭ ne atingis ĝin, sed ĝi estas sur la vojo al la celo.

La sekvonta elmontro de mia konvinko, tion mi esperas, helpu ĝin al tio, iom rapidigi la evoluon en ĉi tiu direkto.

E. D. Morel



ĈAPITRO 1a

La kulpo de la carismo pri la milito

„La nuna milito estas sekvo de imperialistaj celadoj, precipe de la regantaj klasoj de ĉiuj landoj, direktataj al tio, konkeri novajn foirojn kaj subigi malgrandajn aŭ dekadencajn popolojn al sia ekonomia influo.“ Tiel tekstas en eltiraĵo el la publikigoj de la tutrusa kongreso de la laboristaj kaj soldataj delegitoj („Times“, 28an de Junio 1917). En interrilato kun ĉi tiu eldiro estis interese, vidi, kian impreson la pacproponoj de la plenumantaro de U. D. C. faris al la juĝo de eminentaj membroj de la tielnomataj superaj klasoj de la angla societo, de tiaj viroj, kiuj en la ŝtato, eklezio kaj literaturo estas konsiderataj kiel tipaj gvidantoj de la angla societo. Jen oni tuj ekkonas, kiel obstine ankoraŭ ĉiam estas konservata la opinio pri la laŭceleco de punado al la malamiko. La fakto, ke la eldiritaj de la plenumantaro opinioj ne scias ion pri tia antaŭzorgo, laŭ la juĝo de tiuj viroj ŝajnas starigi moralan disigan muron inter ili kaj ni. La deziro pri punado al la malamiko, al kies efikeco oni certe

fidas, devenas malpli de la kolero pri iuj malamikaj agoj dum la irado de l'milito, ol de la firma konvinko, ke la malamiko, precipe kompreneble Germanujo, elvokis la militon — planis ĝin, instigis al ĝi kaj en la psihologia momento senkatenigis ĝin pro zorgeme antaŭkalkulitaj kaj antaŭpripensitaj celoj. Ĉi tiu opinio sendube baziĝas sur sincera konvinko, sed nuntempe ĝi estas unu el la plej gravaj pacmalhelpoj, kiu regas la tutan, vastan teritorion de la militantoj.

Mi persone de post militeksplodo neniam dubis pri tio, ke, se tiu konvinko enradikiĝus, ĉi tio donus al la milito timigan incitegon kaj plilongigus ĝin multe trans la templimon necesan por la honoro kaj intereso de la nacio; per tio multege pliiĝus la malfacilaĵoj, atingi pacon kun certa perspektivo al daŭro.

Konvinkite, ke tiu tute malĝusta opinio, se ĝi estas konservata, sekvigus al si la plej gravan malbonon, mi senlace kontraŭbatalis ĝin, esperante, ke la faktoj kaj argumentoj, kiujn mi prezentis, devus alkonduki pensoŝanĝon, kia laŭ mia opinio estus en la intereso de Anglujo speciale kaj de la mondo ĝenerale. Neniu estas ŝarĝata per mia agmaniero krom mi mem, same kiel mi sola portas la respondecon pri ĉi tiuj miaj eldiroj.

Tial estis por mi granda kontentiĝo, kiam mi antaŭ ne longe legis la jenan konstaton el la plumo de profesoro E. V. Arnold:

„Rilate al la antaŭhistorio de la milito la teorio, ke la milito estas efektivigita kun antaŭa pripenso, sekve de bone pripensita plano de la germana imperiestro (kiel puŝanta forto post relative pacema popolo), nun definitive devas esti forlasata, konsidere al la publikigo de la telegramo de l' germanimperia kanceliero, en kiu ĉi tiu plej decide rekomendis al la Wien-a registaro la anglajn perad-proponojn de l' 29a de Julio 1914.“

(Cambridge Magazine)

Du punktoj en ĉi tiu konstato estas speciale interesaj. Unue, ke profesoro Arnold tion, kio dum tri militjaroj estas citita kiel decidiga kaŭzo por la akuzoj kontraŭ Germanujo, nomas „teorio“; due, ke profesoro Arnold en sia artikolo malakceptas ĉi tiun „teorion“ sekve de unu sola pruvo, kiun la ekskanceliero en Novembro pasinta citis en sia parolado en Reichstag. La teksto de la parolado estas legebla en „Daily Telegraph“ de l' 11a de Novembro 1916. La citita de profesoro Arnold telegramo, datita la 29an de Julio 1914, tekstas:

„Se la aŭstri-hungara registaro malakceptas ĉiun peradon, ni staras antaŭ mondbrolo, en kiu Anglujo estus kontraŭ ni, sed Italujo kaj Rumanujo plej verŝajne ne kun ni tiel, ke ni kun Aŭstrio-Hungarujo starus kontraŭe al tri grandaj ŝtatpotencoj. Sekve de la kontraŭeco de Anglujo, Germanujo devus porti la ĉefpezon de la batalo. La politika prestiĝo de Aŭstrio-Hungarujo, la batalilhonoro de ĝia armeo kaj ĝiaj rajtigataj

pretendoj kontraŭ Serbujo povus esti sufiĉe certigataj per la okupo al Belgrad aŭ aliaj lokoj. Pro tio ni urĝe kaj energie devas konsiderigi al la Wien-a kabineto, akcepti la peradon je la proponitaj kondiĉoj. La respondeco pri la alie okazontaj sekvoj estus treege grava por Aŭstrio-Hungarujo kaj ni.“

Do estas klare, ke germana kanceliero, se li estus intencinta, inciti Wien-on al tio, ke ĝi metu la meĉaĵon al la eŭropa pulvuo, ne ĝuste en ĉi tiu formo estus telegrafinta al Wien; krome estu memorigate pri tio, ke Sir Frank Lascelles, kiu dum kelkaj jaroj estis brita ambasadoro en Berlin, en „Pall Mall Gazette“ de l' 11a de Julio priskribas sinjoron Bethmann Hollweg kiel „nepre honorindan viron“.

Kial Germanujo kredas, ke ĝi faras defendan militon?

Al mi ŝajnas strange, ke oni aljuĝis al tiu telegramo, antaŭ ne longe konatigita de la kanceliero mem, tiel specialan gravecon, kvankam la publikigo mem tute ne signifas malkovron. Pli vere ĝi nur konfirmas tion, kion la publikigita en Aŭgusto de 1914 brita Blanklibro pri la milito kaj aliaj akireblej dokumentoj el tiu tempo jam publike elmontris: ke la diro, ke Germanujo sola estas respondeca pri la milito, ĉar ĝi faris kriman surprizatakon kontraŭ siaj senkulpaj najbaroj *)), estas unu el la plej mirigaj fuŝaliigoj de faktoj, kiujn la historio konas.

*) La rimarkigojn vidu sur paĝoj 56—59. *La trad.*

En la sekvantaj linioj mi pruvos la ĝustecon de la konkludoj de profesoro Arnold kaj montros du speciaĵojn; unue: la germana diplomatio en la lastaj tagoj de la krizo laboris mano en mano kun la nia, por eviti la militon, kaj due: ĉi tiuj provoj malsukcesis pro la kontraŭstaro de la caro kaj liaj ministroj.

Mi neniel volas malfortigi la opinion pri la sufiĉe grava parto de la respondeco trafanta la germanajn militaristojn per la ĝenerala atmosfero de la streĉeco kaj malkonfido, kiu estis ekestinta. Mi ankaŭ ne volas ekskui la ĝeneralan kaj motivitan konvinkon, ke en Germanujo ekzistis aroganta kaj atakema „militpartio“. Mi neniel volas kritiki la kondamnon pri la ne tolerebla, en Germanujo disvastiĝinta kulto de la militarismo mem, kondamno, kiu de neniuj estas pli akre eldirita ol de la germana socialdemokratio, sed mi volas klarigi la militarismon kiel sekvon parte de la malfacila strategia situacio, parte de la granda radikaleco kaj de la organiza talento, karakterizaj por la moderna Germanujo.

Mi ne volas influi ies juĝon pri tio, ke la puŝantaj al la milito fortoj estas serĉeblaj nur en profunde enradikiĝintaj malbonstatoj kaj ke ne nur nekapableco, eraroj kaj krimoj de diplomatio kaj registaroj dum la lastaj, la militon antaŭirintaj semajnoj esence kunhelpis al ties eksplodo.

Sed laŭ faktmaterialo mi volas provi, solvi la enigmon, al kelk-iu ankoraŭ tiel ne klarigeblan,

kial la multe pli granda parto de la germana popolo estas firme konvinkita pri tio, ke ĝi faras defendan militon kaj faris ĝin de komenco. Kia terura malbono povus esti evitata, se en Anglujo oni pli bone komprenus la verecon de ĉi tiu konvinko de la germana popolo! —

Efektive Germanujo la 31an de Julio al la caro kaj liaj ministroj direktis ultimaton, en kiu la ĉesigo de la ĝenerala mobilizo, ordonita la 30an de Julio noktmeze, estis postulata. Ĉar la petpostulo restis sen respondo, Germanujo deklaris la militon. Ĝenerale ja tiu ŝtatpotenco, kiu unue deklaras la militon aŭ komencas malamikaĵojn, altiras al si specialan mallaŭdon. Sed en la milito kontraŭ Ruslando ekbatis Japanujo, kaj kun mortiga sukceso, sen tio ke okazis militodeklaro kaj eĉ nur ultimato antaŭirinta. Sed neniu ĝuste al Japanujo, kaj malpli al ĝi sola, aljuĝos la respondecon pri tiu milito. La registaro de la buroj direktis ultimaton al Granda Britio. Sed neniu sincera anglo nun asertas kaj neniu eminenta aŭtoritatulo de la kontinento laŭ mia scio iam elparolis, ke la sola respondeco pri la milito kontraŭ la buroj estas sur la flanko de la bura respubliko. La kazoj de Japanujo, Transvalo kaj Oranjo-ŝtato, aplikitaj por Germanujo, konfirmas, ke al tiu ŝtatpotenco, kiu faras la unuan baton, ne pro tio necese povas esti aljuĝata la kulpo pri milito. Ĉi tiu pli vere unue devas esti speciale pruvata. Eĉ se la kontraŭuloj de Germanujo povus alporti pruvmaterialon

pri tio, ke la direktantoj de la germana politiko en la kulminacio de la krizo fakte kunlaboris kun aliaj, por haltigi la iradon de la aferoj, kiu laŭ klare elparolita opinio devigus ilin al militodeklaro, la akuzo nuliĝas. Oni kondamnu, sed alimaniere. Kompetenta por tio estas la laŭjura bazo. Kaj la laŭjura bazo estas la decido, ja antaŭe anoncita, pravige rigardi tian iradon de la aferoj kiel ultimaton kaj militodeklaron. Kion mi asertis post tralego de la brita Blanklibro kaj post komparo kun la paroladoj de Sir E. Grey de l' 2a de Aŭgusto, plue laŭ la scio el atingebla por mi alia materialo, tio estas, ke la akuzo kontraŭ Germanujo — kiu, mi ripetas, temas pri krimaj atakoj kontraŭ senkulpaj najbaroj — neniam estis efektive motivita. Mi plue asertas, ke Germanujo, tuj kiam ĝi ekkonis la minacantan militodanĝeron, klopodis moderigi Aŭstrion, kio efektive sukcesis al ĝi en lasta horo kun angla helpo. Krome mi asertas, ke la caro kaj liaj ministroj malsukcesigis ĉi tiun provon per ilia antaŭe pripensita ordono pri mobilizo (t. e. per ilia mobilizado kontraŭ Germanujo; kontraŭ Aŭstrio ili jam estis mobilizintaj), ordono, pri kiu ili sciis, ke ĝi signifas tujan militon.

La carismo mortis! Vivu la vero!

Pri la speciala aŭstria-rusa kontrasto, por kiu la serba konflikto estis la antaŭtakto, mi ĉi tie ne bezonas paroli. Tiuj, kiuj la tutan kulpon aljuĝas al Aŭstrio, ne konas la persistajn intrigojn de la caristaj agentoj, en kies manoj Serbujo estis kaj

kies celo estis la dissolvigo de la aŭstri-hungara ŝtato. Danke al la rusa revolucio oni nun kun pli granda libereco povas skribi pri ĉi tiu delikata afero; ĉar se iam ekzistis okazo, en kiu speciala klarigo de la plej nova estinteco povas destini la estantecon kaj estontecon, jen estas tia okazo. La angla popolo ŝuldas al siaj rusaj fratoj la feliĉon, ne pli longe esti la konfederito de la carismo, ne pli longe kunulo de iniciatoroj de kontraŭjudaj pogromoj, de la ekzekutistoj kaj turmentegistoj al politikaj kaptitoj. La angla popolo ne postploras larmon pri la anoj de la korupta despotismo, signita en la lastaj jaroj per la tomboj de subpremitaj naciecoj kaj la kadavroj de sennombraj politikaj martiroj. Ĉi tiu despotismo povis ekzisti nur per subteno de la angla-franca diplomatio kaj angla-franca financistaro. Do la angla popolo ankaŭ al tiuj, kiuj sen-skrupule ligis ĝin al ĉi tiu politika monstro per feraj, post ĝia dorso kaŝe forĝitaj ĉenoj, ne bezonas obei.

Ni prezentu al ni ankoraŭfoje la situacio de l' 30 a de Julio 1914. Lordo Grey estis forlasinta sian proponon, fini la aŭstrian-rusan disputon en konferenco. Li forlasis ĝin favore al la germanaj proponoj, komenci germanan peradon inter Aŭstrio kaj Ruslando kaj instigi la registarojn al rekomenco de la ĉesigitaj diplomaciaj interrilatoj. Li forlasis ĝin, ĉar li estis plene konvinkita pri tio, ke la germana propono estis pli bona.²⁾ Kaj Germanujo, kies senperan peradon ankaŭ la caro deziris en

telegramo al la germana imperiestro, efikigis sian tutan influon al Wien, por rekomenci la senperajn intertraktadojn kun Ruslando. Kiel energie Germanujo procedis, ni vidis ĉe la priparolo de la pruvmaterialo de profesoro Arnold.³⁾ Ĉe tio Germanujo renkontis la kontraŭstaron de la tre forta Wien-a militpartio, kies apogo je la kortego kaj je la ĵingoj de la gazetaro estis sufiĉe kreskinta sub la efiko de la parta rusa mobilizo de l' antaŭa tago (t. e. la mobilizo kontraŭ Aŭstrio).

Sed ankoraŭ pli grave estis, ke E. Grey kaj princo Lichnowsky kunvenis por konsiliĝo kaj estis interkonsentintaj pri propono al Aŭstrio. Berlin bonvenigis ĉi tiun proponon kaj transigis ĝin al Wien. London kaj Paris telegrafis ĝin al Petersburg kaj tie insiste instigis al ĝia akcepto. Kaj London kaj Paris akompanigis sian admonon kontraŭe al Petersburg per tre klara almondo, ke pliaj militistaj demonstracioj de la cara registaro ne volonte estus vidataj.

El kio konsistis ĉi tiu propono? Ĝi celis, ke Aŭstrio haltigu sian enmarŝon en Serbujon antaŭ Belgrad kaj post okupo al Belgrad kaj ĝia senpera ĉirkaŭaĵo deklaru sin preta, priparoli kompromison (t. e. akcepti peradojn) sub la premiso, ke la militistaj preparoj de la grandaj ŝtatpotencoj intertempe estus ĉesigataj. Ĉi tiu lasta kondiĉo kompreneble unuavice rilatis al la rusa registaro, kiu la sudrusajn armeojn en la antaŭa tago (la 29an) estis mobilizinta kontraŭ Aŭstrio kaj per tio de post la ekesto

de la krizo kiel unua granda ŝtatpotenco okupis senpere minacantan sintenadon kontraŭ aliaj grandaj ŝtatpotencoj.⁴⁾

Pro mi ni do mallaŭdu la germanan registaron tiom, kiom ni volas, ke ĝi ne malhelpis Aŭstrion, tiom procedi kontraŭ Serbujo. Ni ankoraŭ pli mallaŭdu ĝin pro la nekapableco de ĝia diplomatio, ekkoni la influon de la militpartio en Petersburg. Sed aliflanke ni konfesu, kion ni devas laŭ la atesto de nia propra Blanklibro, ke en decidiga stadio de la disputo oni provis deturni la malfeliĉon. Ĝis ĉi tiu momento oni ja povas paroli pri pera respondeco de Germanujo; tiu de Aŭstrio sendube estas senpera. Sed de ĉi tiu momento montriĝas, kiel ni vidos, ke la ĉefa respondeco estas sur la flanko de la carismo.

La gravecon de la angla-germana propono oni en Berlin, Paris kaj Petersburg klare komprenis, same la urĝan neceson de ĉesigo al militistaj demonstracioj flanke de Ruslando.

„Se Aŭstrio“ — tiel lordo Grey la 30an de Julio telegrafis al la brita ambasadoro en Petersburg — „okupas Belgrad-on kaj la najbarajn serbajn teritoriojn, sed post tio deklaras sin preta, pro la bono de la eŭropa paco ĉesigi sian antaŭenmarŝon kaj komenci opini-interŝanĝon pri tio, kiel kompromiso povas esti atingata, mi esperas, ke Ruslando ankaŭ siaflanke konsentos pri konferenco kaj pri ĉesigo al siaj pluaj militagadoj, supoze, ke

la ceteraj ŝtatoj faros la samon.“ (Brita Blanklibro, n-o 103)

„Pro tio mi pensas“, — la franca ministro-prezidanto kaj ministro por eksteraj aferoj la 30-an de Julio telegrafis al la franca ambasadoro en Petersburg — „ke estus bone, se la singardaj antaŭaranĝoj, kiujn Ruslando ankaŭ plue konsideras necesaj por la defendo, estus farataj en formo, kiu al Germanujo ne prezentus pretekston por tuta aŭ parta mobilizo de ĝiaj batalfortoj.“ (Franca Flavlibro, n-o 101)

„Mia registaro“, — tiel reĝo George la 30-an de Julio telegrafis al princo Heinrich de Prusujo, la frato de la imperiestro, — „faras ĉion, por instigi Ruslandon kaj Francujon, ĉesigi siajn militistajn preparojn, se Aŭstrio estas kontenta pri tio, rigardi Belgrad-on kaj najbarajn partojn de serba teritorio kiel garantiaĵon por la efektivigo de kontrakto, en kiu ĝiaj pretendoj povas esti konsiderataj. Mi kalkulas kun la granda influo de la germana imperiestro je Aŭstrio, ke li ricevos aprobantan respondon al ĉi tiu propono. Per tio li pruvas, ke Germanujo kaj Anglujo kune laboras, por eviti internacian malfeliĉon.“ (Brita Blanklibro, p. 538/39)

Tiel staris la aferoj je la 30-a de Julio 1914, kiam en la sekvanta nokto la caro kunvenigis sian militkonsilantaron.

Ĉu Aŭstrio kaj Ruslando akceptus la anglan-germanan proponon? Se ili akceptis ĝin, Eŭropo

ankoraŭ estis savata jam staranta ĉe la rando de la abismo. Se ili malakceptis ĝin, la lasta espero malaperis.

Aŭstrio akceptas, Ruslando mobilizas

Aŭstrio akceptis la proponon. Ĝi telegrafis sian akcepton al Berlin, London kaj Petersburg. Kaj kiam? Ĝia propra Ruĝlibro, almenaŭ nia traduko de ĝi, diras: la 31an de Julio.

La germana ekskanceliero en sia parolado de la 30a de Novembro, kiel jam citite, laŭdiri diris, ke la informo pri la aŭstria akcepto jam „dum la nokto de l' 30a de Julio estis en la posedo de Petersburg. Mi trovas ĉi tiun konstaton nenie konfirmita kaj forlasas ĝin pro manko de tia konfirmo. Sed Aŭstrio akceptis, kaj eĉ se ne la 30an, certe je iu tempo dum la 31a. Tio estas dokumente pruvebla.

Sed kion faris la caro kaj liaj ministroj? Ili sendis al ĉiuj rusaj armeoj la ordonon pri mobilizo! Ilia respondo do estis la mobilizo kontraŭ Germanujo, kies imperiestro ankoraŭ dek horojn pli frue ripete el tuta koro estis dankinta al la caro pro lia perado, kiun li tre alte ŝatis.⁵⁾

Per aliaj vortoj: La caro kaj liaj ministroj, la Petersburg-a konspirantaro, kies membroj hodiaŭ aŭ sidas en malliberejo (la viro, kiu la 30an de Julio estis militministro, hodiaŭ atendas sian punon pro regna perfido); aŭ almenaŭ estas eksigitaj kaj malakceptitaj de la nova Ruslando, kun pripenso kaj

kun plena scio de la certaj sekvoj entreprenis la paŝon, kiu signifis la militon. Ili entreprenis ĉi tiun paŝon, ne demandante la konfederitan Francujon pri tio kaj ne konsultante la „amikiĝintan“ Anglujon.

Ili entreprenis ĝin spite de la oficiale dokumentita konsilo kaj de Francujo kaj de Britio. Ili entreprenis ĝin, kvankam ili sciis, ke Germanujo kaj Anglujo kune estis ellaborintaj proponon, kiu en la antaŭtago estis antaŭmetita en Wien kaj pri kiu oni rajtis atendi, ke Aŭstrio akceptus ĝin, des pli, ĉar estis konate, ke Germanujo faris energian premon al Aŭstrio por akcepto. Ili faris tion, kvankam ili devis scii, ke el ĉiuj ŝtatpotencoj, kiuj disponis pri grava militpotenco, Ruslando estis la plej malmulte vundebla kaj pro tio plej bone povis atendi, ne okupante sintenadon elvokantan al milito.

Sed — ili ne volis atendi. Ne akordiĝis kun iliaj planoj, atendi. La akcepto de la propono per Aŭstrio signifus pacon, malgraŭ la progresanta streĉeco ekestinta en la antaŭa tago per la mobilizo kontraŭ Aŭstrio. Sed ili ne volis pacon. Ili volis militon. Ili bone sciis, ke la angla, germana kaj franca diplomatioj kaj la monarĥoj de Anglujo kaj Germanujo ankoraŭ agadis por la paco. Sed ili same sciis, ke ili rajtis permesi al si, ignori ĉi tiun fakton, ĉar, kion ajn ili faris, Francujo kaj per Francujo ankaŭ Britio estis tenataj de ili en ĉirkaŭpreno, el kiu ili ne povis liberigi sin. Entente efektive estis implikita en komplikitan radaron de sekreta meĥanismo. Ĝi estis ligata per siaj pro-

praj fiksaĵ interkonsentoj, ne povante retiri sin. La carismo, kies krimoj ĝi tiel longe estis tolerinta, tenis ĝin je la gorgo.

Ruslando posedis sufiĉan pruvmaterialon por ĉi tiu malfeliĉa fakto, kiel ni hodiaŭ scias, kaj nia scio estas ankoraŭ ne kompleta. La antaŭan tagon, la 29an de Julio, la franca ministroprezidanto kaj ministro por eksteraj aferoj estis sciiginta al la rusa ambasadoro en Paris, ke Francujo starus sur la flanko de Ruslando.⁶⁾ La franca ambasadoro diris la saman al lordo Grey.⁷⁾ Grey estis atentiginta la germanan ambasadoron en London pri tio, ke Anglujo verŝajne ne povus resti neŭtrala.⁸⁾ Li, Grey, estis informinta la francan ambasadoron pri tio, kion li komunikis al la germana ambasadoro, kaj la franca ambasadoro transigis ĉi tiun komunikon tuj al Paris. Tiel okazis, ke la 29an de Julio la Petersburg-a konspirantaro opiniis, ke ĝi povas agi tiom, kiom ĝi volis. Ĝi entreprenis la unuan paŝon, mobilizante kontraŭ Aŭstrio. En la sama tago la Petersburg-a korespondanto de Reuter telegrafis:

„Laŭ rusa kompreno la ĵetkuboj decidis, kaj nur politika miraklo povas deturni la militon. Parta mobilizo jam estas ordonita, kaj ĉiuj signoj ekzistas por tio, ke la kolosa militista maŝino estas ekmovigota. Cara ukazo estas atendata en la nuna nokto. Fidante al Anglujo, pri kies helpo oni ne plu bezonas dubi, la publika opinio en Ruslando konsentas pri la milito.“

La lasta dubo pri la kulpo de la carismo, kiu eble ankoraŭ povus esti restanta, devas malaperi konsidere al la okazintaĵoj de l' 30a de Julio.

La brita militŝiparo, plene mobilizita por la milito, forveturis el Portland. Ĉi tiu okazintaĵo — tiel komunikas Reuter-telegramo de l' 30a el Petersburg —

„... faris grandegan impreson kaj, kune kun la japana certigo pri paco, plene firmigis la rusan decidiĝecon por la milito.“

Per aliaj vortoj: Oni akcelis la militon ĝuste en la momento, kiam la paco oni havis en la mano.

„Hodiaŭ“ (la 30an de Julio) — tiel raportas la belga ambasadoro en Petersburg al sia registaro — „oni en Petersburg estas konvinkita pri tio, ke Anglujo jam promesis al Francujo, stari sur ĝia flanko. Ĉi tiu promeso pri helpo estis treege grava kaj ne malmulte efikis, fortigi la militpartion.“ (Norddeutsche Allgemeine Zeitung)

En la sama tago la franca ministroprezidanto kaj ministro por eksteraj aferoj kontraŭe al la rusa ambasadoro ripetis sian certigon en difinitaj esprimoj.

„Francujo estas decidiĝinta, plenumi ĉiujn ligo-devojn“. ⁹⁾

„Francujo!“ — Francujo ja tute ne sciis, kiaj estis ĝiaj devigpromesoj. Eĉ hodiaŭ ĝi ankoraŭ ne scias tion. Ĉio, kion Francujo — al Dio estu plendate! — ĝis hodiaŭ scias, estas la premio de la sekretaj interkonsentoj inter francaj politikistoj,

francaj financistoj kaj la carismo, kiu bezonis tiujn por siaj propraj celoj.

La vojo de la Petersburg-a konspirantaro estis klara; la viroj, kies manoj estas makulitaj de la sango de sennombraj rusaj regatoj, la viroj de la reakcio kaj korupto, de la malvirto kaj de l' sanga superstiĉo, kun antaŭpripensoj faris paŝon, pri kiu ili sciis, ke tio signifas: teni fajron al la fuzilo. Ĝuste ĉi tiu paŝo devigis la germanajn socialdemokratojn, kunigi sin kun siaj politikaj kontraŭuloj, kaj efektive tiu paŝo unuigis ĉiujn partiojn en Germanujo.

Kaj pro kiu kaŭzo, pro kiu celo? Mallongan tempon antaŭe la agentoj de Ruslando publike anoncis ĝin en la gazetaro. Nun, kiam la ĵetkuboj estis decidige falintaj, iom post iom malleviĝis ankaŭ la masko, kaj montriĝis la nuda imperialismo kun Konstantinoplo kiel militcelo, la dissolvigo al Aŭstrio-Hungarujo kaj kun la politika estreco pri la tuta Balkano kiel fino. Pro ĉi tiuj celoj la carismo eldevigis la militon. Por atingi ĉi tiujn celojn, ĝi unue allogis siajn okcidentajn konfederitojn, ek-ludante la ambicion de influriĉaj elementoj inter ili. Kaj poste — kiel sinjoro Tŝkerkov, agrikultura ministro de la nuntempa rusa registaro, memorigis — la konspirantoj per minaco pri aparta paco elpremis la subskribon de sekreta interkonsento konvena al iliaj deziroj.

* * *

De ĉi tiu momento la sintenado de Germanujo memorigas pri la du plej novaj historiaj paraleloj: la rusa-japana milito kaj la milito kontraŭ la buroj.

La agmanieron de Germanujo oni povas kondamni responde al la ĵus cititaj paraleloj, sed sentio, ke oni povas atribui al ĝi pli ol al Japanujo kaj al la antaŭa bura respubliko la solan respondecon pri la milito, t. e. oni ne povas aserti, ke ĝi entreprenis subitan atakon kontraŭ senkulpaj kaj ne preparitaj najbaroj. La refuto de ĉi tiu kulpigo devas sekvigi ankaŭ la forlason de tiu punpolitiko, kiu konstante estas sugestata al la brita popolo kaj kiu regas la politikon de la militkabineto.

Ankaŭ ĉe la supozo, ke la respondeco trafas ambaŭ partojn kaj ke nur en la finfazoj de la krizo restas speciala riproĉo sur la carismo, la esploro, sub kiaj cirkonstancoj la germana respondo al la noktmeza decido en Petersburg okazis, ne unuflanke estas farebla, nek pri la sinpravigo de Germanujo en ĝia strategia situacio, nek pri ĝia nesinpravigo per la internacia etiko. Decidige estas, ke la caro kaj liaj ministroj spite de la britaj kaj francaj avertoj donis la ordonon pri la ĝenerala mobilizo, kvankam ili sciis, ke per tio ili malebligis la pacan finnon de la disputo, — kaj ili faris tion eble sub plifortiĝanta devigo de la situacio, sed en la sama momento, kiam elturniĝo el la streĉeco estis ekvidata.

Resumante mi povas fini ĉi tiun ĉapitron per la ripetita almondo pri tri faktoj:

1. Ne konsiderite la multnombrajn avertojn, kiuj eliris de Berlin kaj kiuj estas fiksitaj en la oficialaj diplomaciaj dokumentoj, Sir George Buchanan, la brita ambasadoro en Petersburg, la 25an de Julio — kvar tagojn antaŭ ol Ruslando mobilizis kontraŭ Aŭstrio kaj kvin tagojn antaŭ ol ĝi mobilizis kontraŭ Germanujo — sciigis al la cara ministro por eksteraj aferoj la jenon:

Se Ruslando mobilizus, Germanujo ne estus kontenta pri nura mobilizo, ĉar per tio restus tempo al Ruslando, efektiviĝi sian propran mobilizon, sed verŝajne ĝi tuj deklarus la militon.¹⁰⁾

Per aliaj vortoj: La brita ambasadoro opiniis, ke rusa mobilizo sub la tiamaj cirkonstancoj en Eŭropo, kvankam ne per si mem, tamen per ĝia efiko, estas militagado.

2. Kontraste al la pli frue esprimita kaj ĉi-supre redonita opinio de Sir George Buchanan, Germanujo ne tuj deklaris la militon, kiam ĝi — laŭ ĉiu ŝajno ĉirkaŭ la tagmeza horo de l' 31a — aŭdis pri la rusa ĝenerala mobilizo. La „militstato“, kiu antaŭiras la militistan staton de la mobilizo, estis anoncata je la dua posttagmeze. Post tio okazis la postulo al Ruslando, malmobilizi. La militodeklaro estis transdonata la 1an de Aŭgusto je la 7a kaj 10 min. posttagmeze. Do proksimume 30 horoj estis inter la konatiĝo de la rusa mobilizo en Germanujo kaj la germana militodeklaro.

Mi ne scias ion pri paŝo, kiun la Entente-diplomatio eble estus entrepreninta, por disigi la okcidentajn ŝtatpotencojn de la carista agmaniero, kvankam la mobilizo, kio ankoraŭfoje estu akcentata, laŭ la oficialaj raportoj kontraŭis la britajn kaj francajn dezirojn.

3. La argumento, ke Germanujo ne bezonis ion timi de la rusa mobilizo, devus foriĝi per jenaj militfaktoj: Du tagojn post la militodeklaro, t. e. la 3a de Aŭgusto, la rusoj faris antaŭenpuŝon al Memel.¹¹⁾ La 5an de Aŭgusto ili transpaŝis la landlimon apud Lyk, la 7an la ĉefarmeo de Rennenkampf transpaŝis la landlimon apud Suvalki, dum Samsonov kun kvin armeokorpusoj antaŭenpuŝis el Mlava. La 20an la germanoj estis venkataj apud Gumbinnen, la 21an ankoraŭfoje apud Frankenau kaj Orlau. La 25an, t. e. 24 tagoj post la militodeklaro, tuta Orient-Prusujo ĝis la Weichsel (Vistulo) estis en rusa posedo, kaj en Petersburg oni komencis monkolekton por la rusa soldato, kiu unue enirus Berlinon,

* * *

Ĉi tiuj faktoj ja nek Germanujon nek Aŭstrion povas liberigi de granda parto de la respondeco pri la milito; sed ili montras al la tuta mondo la grandegan parton, kiu — kaj ĝuste en la momento de la plej alta krizo — por la kulpo je militeksplo do ŝarĝiĝas sur la carismo. Ili plifortigas ankaŭ senpere la argumenton, kiun mi elparolis de

post militeksplodo, nome, ke „nacia punpolitiko“, ¹²⁾ bazita sur la akuzo, ke Germanujo estas la sole respondeca kaj kulpa parto, fine devas konduki al malfeliĉo; ĉar la akuzo estas malvera, kaj gvidita de malveraj opinioj nacia politiko devas havi priplendindajn sekvojn por la nacio, al kiu la vero estas trompe kaŝita.



ĈAPITRO 2a

Franca opinio

Post la skribado de la antaŭa ĉapitro mi ricevis broŝuron el Paris. El ĉi tiu rezultas, ke ankaŭ iam trans la Kanalo la vero komencas penetri al la taglumo tra la konfuzajo da mensogoj, kiuj en Francujo kaj Anglujo tiel longe erarigis la publikan opinionon. Kaj se la franca popolo ekscias la veron jam parte, ĝi ne plu estas haltigebla. La eldiro „*La vérité est en marche. Rien ne l'arrêtera*“ estas karakteriza por unu el la plej delikataj trajtoj de la franca sentado.

La broŝuro estas titolita: „Kiu tiris Francujon en la militon?“ (*Qui a entraîné la France dans la guerre?*) Ĝi estis publikigata per la komitato por rekomenco de internaciaj interrilatoj (*Comité pour la reprise des relations internationales*) en Paris, en la Rue de la Grangeaux-Belles n-o 33. Kiel montriĝas el la titolo, la broŝuro pritraktas la saman temon, kiun mi pritraktas ĉi tie, nome la kulpon de la ekscaro kaj liaj ministroj pri la eksplodo de l' milito. Per la franca broŝuro miaj

elmontroj estas konfirmataj ĝis la plej malgranda detalo. La sekvanta mallonga resumo montru tion plue:

La broŝuro komenciĝas per la sentima konstato, kiu estas la ĉefaĵo el ĉio alia:

„Kiom ajn granda la respondeco de Germanujo estas, ne estis ĝia atako, kiu tiris Francujon en la militon, kaj ne estis ĝia atako, kiu puŝis Ruslandon, paŝi al la milito.“

La broŝuro plue montras laŭ multnombraj citaĵoj el la oficialaj militpublikigaĵoj, ke jam en la komenco de la krizo la franca popolo per sia registaro kaj ties diplomaciaj reprezentantoj en la rusa ĉefurbo estis enmanigita al la caro kaj liaj ministroj.

Precipe ĝi atentigas pri la fakto, ke en la franca Flavlibro la telegramo de l' rusa ministro por eksteraj aferoj Sasonov de l' 24a de Julio 1914 estis trompe forlasata, la telegramo, en kiu Sasonov dankas pro la francaj certigoj, dum ĝi estas redonita en la rusa Oranĝlibro.

El ĉi tiuj dokumentoj la broŝuro konkludas:

„Estis nur la franca sekreta kontrakto kun la carismo, la rusa alianco, kaj ĉi tiu sola, kio tiris Francujon en la militon.“

La broŝuro enhavas maldolĉan plendon pri la daŭrigataj de post militeksplodo provoj, kontraste al la realeco sugestita al la franca popolo, ke Francujo fariĝis la viktimo de „bone preparita, subita, perfida atako flanke de Germanujo“. Ĝi konstatas: „Francujo iris en la militon kun kovritaj okuloj“.

La elmonro de la rusa tutmobilizo de l' 30a de Julio en tiu broŝuro plene akordiĝas kun tiu de mi donita. La farita de mi konkludo troviĝas ankaŭ en tiu franca elmonro: ke la angla-germana propono al Aŭstrio de l' 30a de Julio, kiu estis farata samtempe kun la angla-franca petpostulo al Ruslando, ĉesigi la militistajn preparojn, tre bone povus esti ebliginta pacan finon. Ĉi tiu tekstparto estu ĉi tie laŭvorte redonata:

„La paco estas certigita, la sorto de Serbujo en la mano de Eŭropo. La rusa registaro ne plu havas eĉ la ombron de preteksto, por daŭrigi sian mobilizon, antaŭ ĉio ne kontraŭ Germanujo. Preskaŭ tutan tagon ĝi havas por pripenso — —, sed ĉio estas vana. La konsilantaro de la caro rifuzas ĉesigi la mobilizon kaj kun antaŭpripenso elektas por Ruslando kaj Francujo la militon. Certe, kiom serioza, kiom ne pravigebla la rusa minaco estis, la germana registaro tamen estus povinta montri noblan saĝecon, ne akceptante la ĵetitan al ĝi ferganton. Pro plej propra bono Germanujo estu plue cedinta. Minacate per dufronta milito ĝi igis instigi sin al la procedo, kiu estis la respondo al la ĝenerala rusa mobilizo: Germanujo deklaris la militon. Sed la rusa registaro intence faris krimon, kiam ĝi elvokis la militodeklaron. La carista registaro, kiun la provizora registaro prave nomis ‚pro-fundiĝinta en malhonoro kaj malvirto potenco‘, do elvokis ĉi tiun militon, kiu laŭdire estas farata ‚pro juro, civilizacio kaj demokratio‘.“

La broŝuro finiĝas per la fama deklaro de Jaurès en Bruxelles de la 29a de Julio 1914:

„Se oni alvokus kontraŭ ni nian sekretan interligon kun Ruslando, ni alvokus nian publikan interligon kun la homaro.“

Plue tekstas en la franca broŝuro:

„Nur la plenumo de ĉi tiu sekreta interkonsento falegis Francujon en la militon. Sub la ombro de la sekreta diplomatio nia registaro opiniis devi oferi la vivon de la franca popolo al la cara regno.“



ĈAPITRO 3a

La „malkovroj“ de „Times“ kaj ilia celo

La antaŭaj ĉapitroj jam estis pretigitaj por la presado, kiam montriĝis, ke la tielnomataj „malkovroj“ de *The Times* de l' 28a de Julio nunjara estis rigardotaj kiel komenco de lasta, malespera provo, forigi la kreskantan deziron pri paco per intertraktado kaj interkompreniĝo. Oni volis montri laŭdirajn pliajn pruvojn, celante, antaŭ la publika opinio alŝovi la kulpon pri la milito al la centraj ŝtatpotencoj.

Ekzemple Lloyd George en sia parolado en Queens Hall, la 4an de Aŭgusto, uzis la „malkovrojn“ laŭ tio, ke li ankoraŭfoje nomis la militon germana „atenco“ por subigo al Eŭropo.

„Por kio ni batalas?“ li demandis. „Pro defendo kontraŭ la plej danĝera konspiro, kiu iam estas farita kontraŭ la libereco de la popoloj; ĝi estas farita zorgeme kaj lerte, inside kaj kaŝe, kaj estas planita kun senkompata kaj senhonta decidiĝo ĝis en la plej malgrandaj detaloj.“

La sama sinjoro Lloyd George diris naŭ jarojn pli frue, la 28an de Julio 1908, en parolado farita en la sama Queens Hall:

„Oni rigardu la situacion de Germanujo. Ĝia armeo estas por ĝi tio, kio por ni estas nia marino: la sola defendilo kontraŭ eventuala invado. Germanujo ne havas ‚du-ŝtatpotencan Standard‘. Eble ĝi havas pli fortan armeon ol Francujo, Ruslando, Italujo kaj Aŭstrio; sed ĝi sidas inter du grandaj ŝtatpotencoj, de kiuj ĝi per treege pli granda trupoforto ol la ĝia povas esti inundata. Tion oni ne forgesu, se oni miras, kial Germanujo fariĝas suspektema kontraŭ aliancoj, interkompreniĝoj kaj similaj misteraj aferoj, kiaj rimarkiĝas en la gazetaro, precipe en ‚The Times‘ kaj ‚Daily Mail‘! Germanujo sidas en la centro de Eŭropo, enfermita de Francujo kaj Ruslando, kies unuigitaj armeoj estas pli grandaj ol tiu de la germanoj. Ni supozu, ke ĉe ni invado estus ebla sekve de tia kunigo. Ni supozu, ke la militŝiparoj de Germanujo kaj Francujo aŭ de Germanujo kaj Ruslando aŭ de Germanujo kaj Aŭstrio kune estus pli fortaj ol la nia, — ĉu ni ne estus ektimintaj? Ĉu ni ne armadus? Certe!“

Ja, oni diros, — tio estis antaŭ naŭ jaroj! Do antaŭ naŭ jaroj Lloyd George kalkulis kun faktoj. Ĉu tiuj faktoj eble ne estis veraj? Kiu kuraĝas pruvi tion? Sed, se naŭ jaroj estas periodo, en kiu politikaj aferoj povas sangiĝi tiel, ke oni ne plu povas fari konkludojn el tio, oni lasu informi sin pri tio, kion sinjoro Lloyd George ko

monatojn antaŭ la militeksploĉo skribis en „Daily Chronicle“ de l' 1a de Januaro 1914:

„La germana armeo estas priviva demando ne nur por la ekzistado de la Germana Imperio, sed eĉ por la vera vivo kaj la sendependeco de la nacio, ĉar Germanujo estas ĉirkaŭata de aliaj nacioj, el kiuj ĉiu posedas same fortan armeon kiel ĝi mem. Ni forgesas, ke, dum ni pledas por tio, ke nia militŝiparo devas esti je 60⁰/₀ pli forta ol tiu de Germanujo, por garantii la sekurecon de niaj marbordoj, Germanujo eĉ ne kontraŭe al Francujo sola havas similan superecon, dum ĝi tamen devas kalkuli kun Ruslando ĉe sia orienta landlimo. Do Germanujo havas nenion, kio eĉ nur proksimume similas al ‚du-ŝtatpotenca Standard.‘ Pro tio ĝi ekmiregis sekve de pli novaj okazintaĵoj kaj elspezas gravajn monsumojn por la pligrandigo de sia militista forto.“

Kial ĉi tiu klara kaj konata aferstato nun subite estas „kaŝagado“ kaj „insido“? Pro kiu kaŭzo ampleksa armado¹³⁾, entreprenita nur sekve de minacanta danĝero kaj rigardita de sinjoro Lloyd George kiel plene rajtigita, nun subite estu „konspiro“? Kiam nia popolo fine estos tiom progresinta, por postuli de siaj ŝtatviroj politikan sincerecon, precipe tiam, kiam temas pri vivo kaj morto? Kiaj novaj „okazintaĵoj“ en la jaro 1914 instigis Germanujon al timo, kiu laŭ la opinio de sinjoro Lloyd George estis rajtigita?

Estis la revekiĝo de la carista konkerspirito, kiu, kiel la tuta mondo scias, kreis al si minacantan ekkonilon en la grandega pliigo de siaj armeoj kaj marino, en la plioftiĝantaj fortaj atakoj de la panslavista gazetaro kontraŭ Germanujo kaj Aŭstrio kaj ankoraŭ pli en la kreskanta potenco de la carismo super la franca ideo pri revenĝo, kiun la belga ambasadoro en Paris, barono Guillaume, du semajnojn post la deklaroj de Lloyd George nomis „danĝero por Eŭropo kaj por Belgujo, la plej granda, la eŭropan pacon minacanta danĝero“. ¹⁴⁾

* * *

La laŭtempa koincido de la „malkovroj“ de „Times“ kun la militema parolado de Lloyd George frapante strange memorigas pri la somero de 1911, kiam la Maroko-krizo akriĝis tiel, ke milito preskaŭ estus eksplodinta.

La 20an de Julio 1911, kiam la diplomaciaj reprezentantoj de Francujo kaj Germanujo estis okupitaj en Berlin pri konfidenciaj kaj sufiĉe delikataj intertraktoj, „Times“ anoncis, ke la germana registaro faras ne kredeblajn „postulojn“ al Francujo. En rafinite kolerema ĉefartikolo ĝi konatigis la laŭdirajn detalojn de ĉi tiuj postuloj, asertis, ke Germanujo intencas okupi parton de Maroko, plendis pri tio, ke britaj interesoj estas minacataj kaj postulis tujajn energiajn kontraŭrimedojn. En la sekvanta tago sinjoro Lloyd George faris sian konatan alparolon en Mansion-House, kiu efektive signifis sen-

peran minacon al Germanujo. Kiam en la sekvanta tago la parolado tiusence estis komentata en „Times“, ĉi tiuj pritraktoj preskaŭ estus kondukintaj al ĉesigo de la diplomaciaj interrilatoj. La milito estis deturnita kvazaŭ nur per miraklo.

Kvin monatojn poste konatiĝetis sekve de ministeriaj eldiroj, ke en la irado de la cititaj, de „Times“ false interpretitaj intertraktoj Germanujo efektive donis sian konsenton pri franca protektorato super Maroko kontraŭ kompensoj en ekvatora Afriko, ke Germanujo ne faris „postulojn“ al Francujo, sed ke certaj landregionoj tute „ĝenerale“ estis markitaj kiel kompenso (kiun Francujo jam principe estis konsentinta), por kio oni estis proponinta cedon de german-afrika teritorio al Francujo, — ke la franca ambasadoro estis konsiderinta tiujn landregionojn tro grandaj kaj ke oni finis la ide-interŝanĝon en afabla maniero, interkonsentante, renovigi ĝin en konvena tempo.¹⁵⁾

Se tiam milito estus eksplodinta, tio estus okazinta sekve de falsado. Ke ĝi ne eksplodis, ni ŝuldas laŭ mia opinio ĉefe al tri viroj: al sinjoro Caillaux, la franca ĉefministro, al lordo Morlay kaj al sinjoro Bethmann Hollweg. —

* * *

En la nuntempa kazo ne temas pri „malkovro“; ĉar la malkovrotaĵo neniam ekzistis. Temas pri tio, restigi vivkapabla la mortantan legendon pri germana „konspiro“ per tio, ke oni metas okazintaĵojn

(aŭ laŭdirajn okazintaĵojn) en malĝustan perspektivon kaj ke oni, koncentrigante la publikan atenton al tio, ke oni repuŝas en mallumon tutajn vicojn da faktoj, kiuj pene provas penetri tra la nebuloj de la subpremo kaj deformigo al la lumo de l' tago. Ĉi tio estas lerta uzado de la arto de politika hipnozo: la paciento devas seninterrompe fikse rigardi al objekto, ĝis kiam lia perceptkapablo ne plu funkcias kaj li enfundiĝas en staton de senkonsciigo.

Kiaj estas tiuj „malkovroj“ de „Times“, fari-taj de „boninformita korespondanto“? Ili resumi-ĝas koncize en tio, ke en tiu 5a de Julio, unu se-majnon post la murdo al la ĉefduko Ferdinand, la aŭstria tronheredanto, okazis kunveno en Berlin. Ĉi tie ĉeestis, krom la imperiestro kaj la kanceliero kaj aliaj germanaj aŭtoritatuloj, la ministro-prezidantoj, la stabĉefo kaj aliaj eminentuloj de Aŭstrio-Hungarujo. Oni priparolis la ultimaton, kiun Aŭstrio intencis direkti al Serbujo, kaj decidis, insisti pri ĝi eĉ je la danĝero de milito kontraŭ Ruslando.

Jen la „sekreta“, „insida“ kaj „lerta“ konspiro en la parolado de sinjoro Lloyd George.

* * *

La novaĵo de ĉi tiuj teruraj „malkovroj“ estas — se la diroj entute estas veraj —, ke tiuj apartaj intertraktoj okazis en la dirita tago. La fakto, ke tiaspeca decido estis atingata, mallongan tempon post la murdo, ne estas nova. Kio nun estas malkovrata, estas same malnova kiel la milito. Neniam

estis kaŝite aŭ pridisputite, ke Aŭstrio post la morto de la ĉefduko decidis, energie fini la malkaŝan kaj sekretan, per la agentoj de l' carismo influitan propagandon de Serbujo. Pli vere oni de komenco jam deklaris tion tute publike. Neniam estas sekretigite aŭ pridisputite, ke Germanujo decidis, agi konforme kun sia samligano, eĉ se Ruslando intervenus. Kontraŭe, jam de komenco tio estis anoncata kaj publikigata.

La germana registaro konfesis tion en plej klara formo en la senpere post militeksplodo eldonita Blanklibro. Ĉi tiu dokumento estas publikigita de la brita registaro kaj republikigita. Ĉiu povas legi ĝin, kiu por tio volas elspezi ŝilingon.¹⁶⁾

La prijuĝo al tiu decido neniel estas tuŝata per la konatigo, ke ĝi estis farata en certa tago, en certa loko kaj en ĉeesto de certaj personoj. Certe okazis tiam ankoraŭ pli da kunvenoj kaj interkonsiliĝoj. Sekve, ĉu tiu decido estis pravigita aŭ senhonta, tio ne koncernas la demandon, ĉu la germana registaro estis vidanta la veran tekston de la ultimato aŭ ne. Laŭkonfese ĝi konis ĝian enhavon, se ĝi ne konis la precizan tekston.

El kio do konsistas la poento de la „malkovroj“ de „Times“?

Ni diru, ke la decido de la centraj ŝtatpotencoj estis maljusta, krima, senhonta aŭ Dio scias kia. Sed ĉar la malamikaj registaroj de post militeksplodo laŭte sciigis al la tuta mondo, ke ili faris

tiun decidon, kaj ĉar ili samtempe diris la kaŭzojn, pro kio ili faris ĝin — kie do estas la „sekreta“, „insida“ kaj „senhonta“ komploto, kiun „Times“ opinias esti malkovrita?

En la decido mem sidas la kunrespondeco de Aŭstrio kaj Germanujo pri la milito. Ili ne povas liberigi sin de tio. Ili ŝajne ankaŭ neniam faris la provon por tio. Ili eĉ asertas, ke ili faris tiun paŝon kun plena rajto. Neniu en iu lando, kiom mi scias, iam provis malkondamni ilin de la respondeco pri ilia ago.

* * *

Sed kio instigis la centrajn ŝtatpotencojn al ĉi tiu paŝo? Ĉi tiun cirkonstancon oni ĉiam malatentis, prijuĝante la aferstaton.

Kial ĉi tio okazas? Kial niaj regantoj ankoraŭ hodiaŭ, kiam la carismo jam de longe estas enterigita, rifuzas malkovri ĝiajn intrigojn kontraŭ Aŭstrio sur la Balkano, kie ĝi uzis la plendojn de Serbujo same kiel rimedon por siaj celoj, kiel ĝi ankaŭ kontraŭ ni de multaj jaroj intrigas en Hindujo kaj ĉe tio uzas Afganistanon kiel sian ilon?! Se ni silentas pri tio, tio certe ne okazas pro komplezo al la demokratia Ruslando! Kial la unu flanko de la afero ĉiam estas tiel anoncata kontraŭe al la brita publiko, dum la alian flankon oni kaŝas kun la sama persisto?

Pro neniu alia kaŭzo, ol pro la malespera deziro, konservi la legendon pri „komploto“, por tia-

maniere malebligi la preparon por paco de l' interkonsento kaj anstataŭ tio konservi la „batalon ĝis ekstremo“ kun ĉiuj pluaj teruraj perdoj je homvivoj kaj la terura plilongigo de ĉiuj suferoj sekvantaj ĝin.

* * *

La disputaĵo inter Aŭstrio kaj Serbujo ekzistas jam de longe. Sur ambaŭ flankoj oni faris erarojn. Serbujo havis rajtigitajn plendojn kaj same Aŭstrio. La parton, kiun de 1909 la rusaj agentoj havis je la akriĝo de la disputoj, estas konata de ĉiuj konantoj de eksteraj aferoj. La celoj, kiujn la carismo laŭiris, apenaŭ estis sekretigitaj. Oni celis detruon al la duobla monarĥio, provante okazigi revoluciigon al la sudslavaj elementoj. La libera Ruslando malakceptis ĉi tion politikon. Sed ankoraŭ hodiaŭ ĝi restas la politiko de la italaj imperialistoj kaj de influriĉa grupo en nia lando. Ni scias, ke Aŭstrio en la jaro 1913, se ĝi ne estus retenita de Germanujo, kontraŭe al Serbujo estus farinta la ekstremajn paŝojn. La pruvoj por tio estas donitaj en la belgaj diplomatiaj depeŝoj, en la raportoj de Gioletti en la itala parlamento, la 5-an de Decembro 1915, kaj en tiaj libroj pri la Balkano, kia estas ekz. tiu de kolonelo-leŭtenanto Rankin.¹⁷⁾

La murdo al la aŭstria tronheredanto estis la decidiga okazintaĵo, kiu ekrulis la tutan materion. Tiam Germanujo ne pli longe provis reteni Aŭstrion. Estas dubo, ĉu ĝi povis fari tion, ne riskante perdisian solan certan liganon en Eŭropo. Oni prezentu

al si, kiel ni estus agintaj en simila okazo, se post multaj jaroj de la intrigo kontraŭ nia estreco la princo de Wales subite estus murdita de afgano sur brita, al Afganistano limanta teritorio. Sed tio estu kiel ĝi volu: Germanujo devas porti la respondecon antaŭ la historio pri tio, ke ĝi subtenis sian liganon, kiel ankaŭ la carista Ruslando, kiu nek pere nek senpere estis minacata, devas porti la respondecon antaŭ la historio pri tio, ke ĝi okupis sin pri la serba afero; ĉar ĝis 1908 Ruslando estis teninta sin frapante indiferece kontraŭe al Serbujo kaj ties konstantaj disputoj kun Aŭstrio. Ĝia ŝanĝita sintenado neniel interrilatis kun la rajto aŭ malpraveco de la interdisputintaj partioj.

Se la carismo ne estus insistinta pri tio, uzi la disputon inter Serbujo kaj Aŭstrio en la jaroj 1914 kiel pretekston por malamika procedo kontraŭ Aŭstrio, kaj se Eŭropo ne estus disigita per du sistemoj de interligoj, oni estus povinta limigi la malfeliĉon je ĝia komencejo, kaj la popoloj de Eŭropo, kiuj estus interrilatintaj kun ĉi tiu disputo ne pli ol sudmaro insulano, hodiaŭ ne sterkus la teron per sia sango.

Kiel ajn la postvivantaro dividos la kulpon pri ĉi tiu terura tragedio, ĝi certe ne ŝargos la kulpon sur unu el la militantoj sola.

Tio sola estas la afero, kiu hodiaŭ elkore okupas min, la afero, kiun mi energie prezentas al miaj samlandanoj, por ke estu haltigata la terura

oferado, konsumanta la plej bonajn kaj plej noblajn el la virfloraro de la popoloj!

* * *

Kio ne povas esti ekskuata per la unuigita potenco de „Times“ kaj Lloyd George, de malkovroj kaj akuzantaj insultparoladoj, sed kio antaŭ la okuloj de ĉiuj detruas la legendon pri la „konspiro“, tio estas la rokfirma fakto, ke Germanujo, kiam la krizo de l' somero de 1914 estis atinginta sian kulminacion, kune kun Anglujo alcele laboris por paca solvo, ke vojo por paca solvo efektive estis trovita, kiu la popolojn estus elkondukinta el la marĉo, se ne tiu meznokta ordono pri ĝenerala mobilizo estus donita de korupta aŭtokratio, kiu nun ruiniĝis sub la fortegaj batoj de popolo de longe sklavigita.

La carismo mortis, por neniam reviviĝi. Ĝiaj pilastroj estas detruitaj, ĝia templo ruiniĝinta.

Ĉu la popoloj de Britio, Francujo, Germanujo, Aŭstrio-Hungarujo kaj Italujo el la malapero de tiu iam tiel granda kaj aganta por la krimo potenco ne volas ekkoni, ke la tempo estas veninta, por nun kune kun la rusa popolo helpi al tio, ke la procedo de reciproka ekstermo, de kiu iliaj regantaj klasoj laŭŝajne ne povas liberigi sin, estu ĉesigata kaj ke anstataŭu ĝin paco, — paco naskita el rekono de ĉiuj pasintaj eraroj kaj bazita sur la komuna decido, starigi pli puran kaj pli sanan kulturon?



ĈAPITRO 4a

„The Times“ kaj la rusa tutmobilizo

Se ankoraŭ pruvo estus necesa por tio, kiel mirige senskrupule decidiĝintaj estas tiuj, kiuj kontraŭstaras sin al fino de l' milito, kiuj malespere batalas, por malebligi la internacian socialistan kongreson en Stockholm, kiuj ankaŭ persistas pri la germana „konspiro“, ĝi estus donita per la ĉefartikolo de „Times“ de la lasta 7a de Aŭgusto. En ĉi tiu ĉefartikolo „Times“ diras:

„La imperiestro diras, ke li konsentante peris la proponon al Wien. Sed li forsilentas la gravegan fakton, ke Aŭstrio-Hungarujo akceptis la proponon kaj en ĉi tiu senco raportis al Berlin, post kio sinjoro von Bethmann Hollweg metis la akcepton en la poŝon kaj nenion plu raportis al London aŭ al Petersburg. La imperiestro konfesas, ke Aŭstrio-Hungarujo akceptis la proponon, kaj provas klarigi, kial la akcepto ne estis transigata. Li diras, ke li ĝuste ekpreparis noton al la caro kun la enhavo, ke Aŭstrio-Hungarujo estas preta, akcepti la peradon, kiam li aŭdis, ke Ruslando ordonis la tutmo-

bilizon. Kial Ruslando mobilizis? Tial ke oni faris petolaĵon al la rusa registaro, pli malkuraĝan ol la aliĝo de la Ems-a telegramo per Bismarck. Laŭ instigo de la germanaj potenculoj oni publikigis eldonon de l' duonoficiala „Berliner Lokalanzeiger“, en kiu estis konigate, ke Germanujo ordonis tutmobilizon. La rusa ambasadoro tuj telegrafis ĉi tiun informon al Petersburg. La eldono de la gazeto post tio estis konfiskata, kaj revoko estis publikigata. La rusa ambasadoro tuj telegrafis la revokon, sed la dua telegramo intence estis retenata en Berlin dek du horojn, ĝis kiam la caro estis doninta la ordonon pri kontraŭmobilizo. Germanujo volis devigi Ruslandon, mobilizi. Ĝi atingis sian malpian celon kaj sur tio bazis sian tutan aferon.“

Nu, almenaŭ unu progreso: Ni havas ĉi tie specialajn konstatojn, kiuj estas kontroleblaj. Jen unue la konfeso, ke Aŭstrio akceptis la proponon de Grey-Lichnowsky. Mi ne memoras, ke „Times“ antaŭe konfesis ĉi tiun fakton. Povas esti, ke mi ne atentis tion. La konstato kompreneble estas ĝusta.¹⁸⁾ Sed „Times“ nun konfesas tion nur, por fari akuzon kontraŭ la germana ekskanceliero. Ĉiu nobla homo, kia ajn estas lia opinio pri la milito, se li konservis al si nur iun senton, kvankam ne pri konveneco, tamen almenaŭ pri la mezuro kaj pezo de la aferoj, devas esti indignita, trovi tian akuzon en gazeto, kiu en la eksterlando ankoraŭ ĉiam estas rigardata kiel la paroltubo de la regantaj klasoj en Anglujo.

La akuzo estas tia, ke la aŭstria registaro informis la germanan pri la aŭstria akcepto kaj ke la tiama kanceliero ĉi tiun akcepten „simple metis en la poŝon“, anstataŭ komuniki ĝin al London aŭ Petersburg.

Ni atentu, kion oni pretendas de ni kredi. Ni kredu, ke la ripetitaj kaj urgaj admonoj de la kanceliero al Wien estis elpensita farso, sed ne farso, por trompi la mondon; ĉar ĝuste tiu telegramo, kiu estis redaktita plej decide, ĝis la lasta Novembro estis detenata de la publikigo (supozeble pro indulgo al la sentoj de la aŭstria ligano). Kiom malmulte da prudento oni supozas ĉe la homoj, opiniante, povi kapti ilin per tia sensencaĵo? En vereco la aŭstria ministro por eksteraj aferoj telegrafis la akcepton de la propono ne nur al Berlin, sed ankaŭ al London kaj Petersburg. La ĉi-tiurilata telegramo komenciĝas jene:¹⁹⁾

Grafo Berchthold al la imperiestraj-reĝaj ambasadoroj en London kaj St. Petersburg.

(Telegramo) Wien, la 31an de Julio 1914.

„Mi telegrafas al Berlin la jenon:“

(Sekvas la teksto.)

Kaj pri ĉi tiu telegramo, kiu enhavas la akcepton de Aŭstrio, „Times“ asertas kun same granda impertinenteco kiel malvereco, ke la germana kanceliero ne transigis ĝin al London aŭ Petersburg!

Kial la germana kanceliero estu transdoninta ĝin al Petersburg? Aŭstrio mem sciigis la akcepton de la propono al London kaj Petersburg, kiel estis kompreneble per si mem por suverena ŝtato.

* * *

La tria konstato, pli vere vico da konstatoj, havas, kiom tio entute estas ebla, ankoraŭ pli eksterordinaran karakteron. La celo estas, klarigi kaj pravigi la cirkonstancojn, sub kiuj la caro kaj liaj ministroj ordonis sian mobilizon, kaj en la sama momento, en kiu la aŭstria akcepto al la propono de Grey-Lichnowsky signifis pacon.

Oni volas fari al ni kredebla la jenon: La rusa ĝenerala mobilizo estis la rezultato de tro frua anonco de la germana ĝenerala mobilizo en „Lokal-Anzeiger“ (kiu kelkfoje estas uzata kiel duonoficiala organo); ĉi tiu anonco estis „malkuraĝa artifaĵo“; la koncerna eldono estis konfiskata; la rusa ambasadoro sciigis la revokon, sed ĉi tiu telegramo „intence estis retenata en Berlin dek du horojn“, t. e. tiel longe, ĝis la caro estis farinta sian sortopezan ordonon pri tutmobilizo.

Mallonge: Laŭ „The Times“ la caro kaj liaj ministroj en sia noktmeza interkonsiliĝo ordonis la ĝeneralan mobilizon sub la impreso, ke la anonco en „Lokal-Anzeiger“ baziĝas sur vero, ke Germanujo estis mobilizinta kaj ke Ruslando nur respondis ĉi tiun germanan procedon; sed ke la germana registaro intence lasis la caron kaj liajn ministrojn kredantaj

tion, por instigi ilin al ĝenerala mobilizo, kiu poste ebligus al Germanujo, ŝovi la tutan kulpon pri la milito sur Ruslandon.

* * *

Se en ĉi tiu miriga historio estus io vera, ni ne nur nun ekscius ion pri tio per „The Times“. Tiukaze oni estus eksciinta tion jam de la rusa registaro mem.

Ĉu iu registaro ne estus uzinta tiel bonegan okazon, neniigi la kontraŭulon? Oni prezentu al si la aferon! Jen efektive estus estinta „konspiro“, kiun oni estus povinta malkovri! La rusa registaro certe estus rapidiginta sin, por pravigi sin antaŭ la mondo, post kiam ĝi estis ricevinta la „intence retenitan telegramon“ de sia ambasadoro.

„Jes“, ĝi estus dirinta, „ni ordonis ĝeneralan mobilizon. Sed kial ni ordonis ĝin? Ĉar pere de ne kredebla trompo oni igis nin kredi, ke Germanujo mobilizis. La telegramo de nia ambasadoro, kiu informis nin, ke la sciigoj ne estis ĝustaj, intence estis detenata de ni; ĉar la telegramo nur nun atingis nin, kaj ĝi estu atinginta nin jam antaŭ dek du horoj. Se ni ne estus kredintaj la anoncon en ‚Lokal-Anzeiger‘, ni kompreneble ne estus ordonintaj ĝeneralan mobilizon. Grandegan friponaĵon oni faris al ni. Ni alvokas la tutan mondon kiel atestanton por tio, ke ni fariĝis la viktimo de malnobla konspiro.“

Ĉu iu kun sanaj sentoj efektive povas kredi, ke la tiama registaro de Ruslando tian senhontan manovron ne tuj estus brulstampita antaŭ la tuta mondo, kiam ĝi poste ricevis la germanan petpostulon pri malmobilizo? Ĉu iu kun sana homintelekto konsideras ebla, ke ĝi ne tuj estus konatiginta la tutan aferon?

Sed nenio tia okazis. En la deklaroj de la tiama rusa registaro ne unu vorto estas trovebla pri la raporto de „Lokal-Anzeiger“. Nur tute supraĵe estas rimarkigate, ke Germanujo „faras aktivajn militistajn preparojn“. ²⁰⁾ Sed tion ĉiu registaro en tiu kriza tempo supozis pri la alia. En la motivo de la ĝenerala rusa mobilizo estas dirita nenio, tute nenio pri tio, ke la mobilizo estis ordonata kiel respondo al germana anonco pri mobilizo, kiun oni devis konsideri aŭtentika. Pri germana mobilizo entute ne estas parolate. Same malmulte la laŭdire en Germanujo retenita telegramo de la rusa ambasadoro estas menciita. ²¹⁾

„Ni estis devigataj al mobilizo“, — diras la rusa ministro por eksteraj aferoj en rondira depeŝo, kiun la 2an de Aŭgusto 1914 li sendis al ĉiuj rusaj reprezentantoj diplomaciaj en la eksterlando ²²⁾ — „per la grandega respondeco falinta sur nin, se ni ne estus aranĝintaj ĉiujn eblajn singardorimedojn en tempo, kiam Aŭstrio, unuflanke sin limigante je prokrastantaj intertraktadoj, aliflanke samtempe bombardis Belgrad-on kaj entreprenis ĝeneralan mobilizon.“ ²³⁾

Estas do la sintenado de Aŭstrio, kiu estas pretekstata kiel klarigo pri la noktmeza rusa milit-konsiliĝo. Nenio alia!

Laŭ sciigo de l' brita ambasadoro en Petersburg de la 31 a de Julio²⁴⁾, la decido okaziĝis sekve de la raporto de l' rusa ambasadoro en Wien, laŭ kiu Aŭstrio estis decidinta, ne akcepti la intervenon de la ŝtatpotencoj, kaj kiu plue diris, ke kaj kontraŭ Serbujo kaj kontraŭ Ruslando trupoj estas ekalmarŝantaj.²⁵⁾

„Estas teknike maleble, interrompi niajn militistajn preparojn“ — tiel la caro telegrafis al la germana imperiestro la 31 an de Julio, je la 2 a horo antaŭtagmeze²⁶⁾, kiam la rusa ĝenerala mobilizo estis plene funkciiganta, kiu laŭdire fariĝis necesa sekve de la aŭstria mobilizo.²⁷⁾

Necesiĝinta per la aŭstria mobilizo! Ne: „necesiĝinta“, ĉar vi (la germanoj) intence igis min kredi, ke *vi* mobilizis, ĉar vi retenis la telegramon de mia ambasadoro, ĉar vi faris abomenindan artifikajon kontraŭ mi!

* * *

Ĉu por honestaj homoj ankoraŭ plia pruvo estas necesa, por karakterizi la batalmetodojn, kiuj ĉe ni estas aplikataj de certaj rondoj, por plilongigi la militon kaj malakceli la pacon?



Postparolo

La civila loĝantaro de Anglujo per la milito suferis malpli ol la civila loĝantaro de la aliaj militantaj ŝtatoj de Eŭropo. Sed ĉu ne ĝuste tio vivigu en ni la deziron, efikigi nian tutan influon, por plimallongigi la suferon de la civila loĝantaro en aliaj landoj? Ĉu tio ne pli multe instigu nian civilan loĝantaron, akceli traktadojn inter la militantoj?

En kio sidas danĝero ĉe tiaj intertraktoj celantaj trovi elturniĝon el la senfina buĉado? Kial nia registaro timas jam la nuran penson, ke la laboristaj reprezentantoj de la aliancanoj kunvenu kun tiuj de la malamikoj, kontraŭe al kiuj ili estus multe pli multnombraj? Ĉu la laboro ne havas la rajton pri voĉo por interkonsento? Ĉu la daŭrigo de ĉi tiu priplendeginda senĉesa buĉado estas io tiel dezirinda, ke la penso pri intertraktoj, por fini tion, estu rigardata kiel io senhonora? Ĉu la paco estu evitata kiel pesto kaj ĉi tiu daŭrigata dezertigo laŭdata kiel la triumfo de la politiko?

Oni diras al ni, ke intertraktoj estas senutilaj.

Kial? Anglaj kaj germanaj reprezentantoj antaŭ ne longe kunvenis, kaj jam post malmultaj horoj ili estis interkonsentintaj destinojn, kiuj celas plifaciligon al la maldolĉa sorto de miloj da anglaj kaj germanaj kaptitoj. Kial do ne intertrakti, por fini la tuton? Kiom longe provo ne estas entreprenita kaj malsukcesinta, ni ne havas pruvon por tio, ke ĝi ne kondukus al same bonaj rezultoj. Kial do la timo de intertraktoj?

— — — — —

Naŭ milionoj da mortintoj! Kial ne intertrakti? Tridek milionoj da vundegitoj kaj kripluloj! Kial ne intertrakti? Miloj da viroj mortas ĉiutage. Kial ne intertrakti? Dekmiloj vidas la morton antaŭ la okuloj. Kial ne intertrakti? Denova dumvintra luktado en la tranĉeoj. Kial ne intertrakti? Ne direbla mizerego por sennombraj el niaj kamaradoj. Kial ne intertrakti? Ĉagreno kaj suferoj por sennombraj virinoj kaj infanoj. Kial ne intertrakti?

— — — — —

Post tri jaroj da terura buĉado Eŭropo ne pliproksimiĝis al la solvo de la problemo, kiun Eŭropo tamen devas solvi, aŭ ĝi faras memmortigon! Kial ne foje provi alian vojon? Kial ne intertrakti?



Rimarkigoj

- 1 (p. 15) El „Du pensoj“ de Milles Malleson (National-Labour Press).
- 2 (p. 19) Brita Blanklibro, n-o 67.
- 3 (p. 20) La telegramo de sinjoro Bethmann Hollweg de l'30a al la germana ambasadoro en Wien, publikigita en „Westminster Gazette“ de l'1a de Aŭgusto 1914, estis tre energia. Vidu „Truth and the War“, p. 32—33.
- 4 (p. 21) En la sama tago, en kiu la carismo okupisian provokantan sintenadon, la caro telegrafis, dankante pro la peranta telegramo, al la imperiestro: „Estus ĝuste, se la aŭstria-serba konflikto estus transdonata al la Haag-a konferenco.“ La transdono al la Haag-a konferenco ĝis tiam neniam estis proponita per la rusa aŭ alia registaro.
- 5 (p. 23) Eltiraĵo 23a el la germana Blanklibro. La telegramo de l'caro estas datita la 30an de Julio je la 1.²⁰ antaŭtagmeze.
- 6 (p. 25) Rusa Oranĝlibro, n-o 55.
- 7 (p. 25) Brita Blanklibro, n-o 87.
- 8 (p. 25) Brita Blanklibro, n-oj 87 kaj 89.
- 9 (p. 26) Franca Flavlibro, n-o 101.
- 10 (p. 29) Brita Blanklibro, n-o 17.
- 11 (p. 30) Laŭ la raporto de la aŭstria ambasadoro en Berlin ili en Schuiden supozeble la 2an (la telegramo estas datita la 2an) transpaŝis la landlimon. (Aŭstria Ruĝlibro, n-o 56)

12 (p. 31) Kelkaj opinias, ke, krom por la politika krimo, esti kaŭzintaj la militon, la malamikaj ŝtatpotencoj estu ankaŭ „punataj“ pro sia militado mem. Pri ĉi tiu naŭza afero estu menciataj kvar punktoj.

Unue: La punado al nacio kiel revenĝo por la pekoj de unuopuloj estas nek morala nek logika. La buĉado al miloj da aŭstrianoj kaj germanoj pro tio, kion krimis unuopaj germanoj kaj aŭstrianoj, ja ne signifas puni tiujn, kiuj laŭ nia opinio meritis punon!

Due: Se ĉi tiu punteorio entute estu aplikata, ĝi devus esti aplikata ĉie (ekzemple por la rusa invado en Orient-Prusujon kaj la rusaj hontindaĵoj en Armenio, kiujn ja Duma mem kondamnis). Sed se oni ĝenerale volus praktike transigi la teorion al la politiko, tio degeneriĝus al sistemo de neniam finiĝantaj repremaĵoj.

Trie: En la multe pli granda multnombro da okazoj, en kiuj sur unu flanko abomenaĵoj estas asertataj, la publiko en la koncerna militanta ŝtato ne estas kapabla al senpartia juĝo, ĉar ĝi neniam konas ĉiujn faktojn, sed nur tiujn, kiuj celu inciti la loĝantaron al fanatikaĵoj kontraŭ la malamiko.

Kvare: Ĉiuj tiaj punaranĝoj povas kompensi nek la abomenaĵojn faritajn de post la militeksplozo, nek la mizeron de la homaro kaŭzitan dum unu batalsemajno. La milito mem estas la radiko de ĉiuj abomenaĵoj.

Kaj fine: La postulo pri kompensoj kaj pri ĉiuj tiaj repremaĵoj, por puni unuopajn barbaraĵojn faritajn dum milito, en la estinteco ĉiam montriĝis ne efektivebla. Klasika ekzemplo por tio estas la Sepjara Milito. Ĉi tiu por la partoprenintoj en ĝi estis same sanga kaj sovaĝa, kiel la nuna milito en laŭnombro pli granda amplekso kaj konsidere al la

militinstrumentoj. Sed en la intertraktadoj, kiuj finigis tiun militon, oni devis rekoni la maleblecon de posta punado. Pro tio en la konferenco en Paris de la 10a de Februaro 1763 oni fiksis inter Granda Britio unuflanke kaj Francujo kaj Hispanujo aliflanke la jenon: „Ĉio estu forgesita, kio de post eksplodo de la nun finita milito estas efektivigita kaj farita.“ Kaj la paco de Hubertusburg, farita la 15an de Februaro 1763, inter Prusujo kaj ĝiaj konfederitoj unuflanke kaj Aŭstrio kaj ĝiaj konfederitoj aliflanke, destinis: „Ĉio sur ambaŭ flankoj fariĝu eterne forgesita, kaj estu proklamata ĝenerala amnestio por ĉiuj dum la lastaj malpacaĵoj de unu el la du partioj faritaj malamikaĵoj, perdoj, por malutilo kaj maljusto, kia ajn ili estis. Ili ne plue estu menciataj, nek estu postulata iu kompenso sub ia preteksto aŭ per ia motivado.“

- 13 (p. 38) Laŭ statistika tabelo Francujo kaj Ruslando unuflanke, kontraŭe al Germanujo kaj Aŭstrio aliflanke, por la armea kaj marina etatoj en la tempo de 1895 ĝis 1904 plielspezis 247827028 pundojn kaj en la tempo de 1905 ĝis 1914 229868853 pundon.
- 14 (p. 39) Vidu „Truth and the war“. (National Labour Press)
- 15 (p. 40) Vidu ĉapitron XXII: „Dek jaroj da sekreta diplomatio“. Vidu same: „Novaj notoj pri la franca Flavlibro“, dua, tria kaj kvara eldonoj. (National Labour Press)
- 16 (p. 42) Vidu la enkondukon en la germanan Blanklibron, p. 406—07. „Kolektitaj diplomaciaj dokumentoj pri la eksplodo de la eŭropa milito.“ (Harrison and Sons)
- 17 (p. 44) La interna historio de la Balkan-milito. (Constable)
- 18 (p. 48) La sekvanta tekstparto en la antaŭparolo al la aŭstria Ruĝlibro estu redonata ĉi tie (p. 447 de la brita Ruĝlibro de la kolektitaj dokumentoj):
„La 30an de Julio la angla ŝtatsekretario denove

proponis, ke Aŭstrio-Hungarujo en sia konflikto kun Serbujo servigu al si la peradon de la ŝtatpotencoj. Gvidate de la deziro, fari sian plej eblan, por konservi la mondpacon, la imperiestra kaj reĝa registaro deklaris sin preta, akcepti ĉi tiun peradon. Sed la honoro kaj intereso de Aŭstrio-Hungarujo pretendis, ke ĉi tio ne okazu sub la premo de la minacantaj aranĝoj de Ruslando. Pro tio ĝi antaŭ ĉio devis postuli, ke la malamikaj mobiliz-aranĝoj de la cara regno unue estu nuligataj. Ĉi tiun postulon la Petersburg-a kabineto respondis per la mobilizo de la tutaj rusaj batalfortoj.“

19 (p. 49) Aŭstria Ruĝlibro, n-o 51.

20 (p. 52) Brita Blanklibro, n-o 113.

21 (p. 52) La telegramo mem estas redonita en n-o 62 de la rusa Oranĝlibro kaj tekstas: „Berlin, la 30-an de Julio 1914. La ministro por eksteraj aferoj ĵus telefonis, ke la informo pri la mobilizo de la germanaj armeo kaj militŝiparo, kiu ĵus estis disvastigata, estas malĝusta kaj ke la gazetfolioj estis anticipe presitaj, por ĉiukaze esti pretaj; ke ili estis disvastigataj en la posttagmezo, sed nun konfiskitaj.“

22 (p. 52) Rusa Oranĝlibro, n-o 73.

23 (p. 52) La aŭstria ĝenerala mobilizo *sekvis* kaj *ne antaŭiris* la rusan. Vidu la britan Blanklibron, n-ojn 113 kaj 127.

24 (p. 53) Brita Blanklibro, n-o 113.

25 (p. 53) En la sama tago la akcepto de la Grey-Lichnowsky-a propono per Aŭstrio estis telegrafata al Petersburg per la ministro por eksteraj aferoj!

26 (p. 53) Germana Blanklibro, enkonduko.

27 (p. 53) Kiel supre estas konstatite, la aŭstria ĝenerala mobilizo *sekvis* kaj *ne antaŭiris* la rusan.

Nova Esperanto - Biblioteko

Ĉi tiu kolekto enhavos pritraktojn ĉiutemajn pri nuntempaj problemoj kaj okazaĵoj kaj ankaŭ literaturaĵojn. Ĝis nun aperis:

No 1. La kulpo de Entente. Konciza resumo kunmetita el oficiala materialo. (Eldonita de Germana Esperanto-Servo)

No 2. La efikoj de la U-boata milito laŭ oficialaj elmontroj el komenco de Aŭgusto 1917. (Eldonita de Germana Esperanto-Servo)

Noj 3-4. La granda mensogo. Traduko de la angla broŝuro „*Tsardom's part in the war*“ de E. D. Morel. (Eldonita de Germana Esperanto-Servo)

Ĉiu numero kostas 30 Pf.

Friedrich Ellersiek, ^{Esperanto-}Verlag, **Berlin S 59**


La germana inteligentularo kaj la milito

Broŝuro de *N. Kabanov*, laŭ la rusa originalo esperantigita de *E. B. Wüster* kaj *B. Maske*.

Prezo 50 Pf.

Interesemuloj eksterlandaj laŭ deziro povas senpage ricevi la tre legindan verketon per

Deutscher Esperanto-Dienst Berlin S 59



Germana Esperanto - Servo, Berlin

G. E. S. aperigas la ĉiumonatan ilustritan gazeton

Internacia Bulteno

Germana informilo pri la milito

Abonprezo: 4.— M por tuta, 2.— M por duona jarkolekto

Kiel apartaj broŝuroj kaj aldonoj ĝis nun aperis:

La origino de la mondmilito

de Dro Helfferich (elĉerpita)

La venonta milito de Delaisi 0.55 M

Memorando pri la traktado al la germanaj konsuloj en Rusujo kaj pri la detruo al la germana ambasadorejo en Petrograd 0.25 M

La mensoga militiro per bildoj (bildfolio) 0.25 M

Albumo pri germanaj militkaptitejoj 0.90 M

La finbatalo, Dokumentaro pri la ne limigita U-boata milito 0.50 M

Pilorio, Raportaro pri la traktado al germanaj vunditoj kaj militkaptitoj en la landoj de Entente 0.85 M

La kulpo de Entente (Nova Esperanto-Biblioteko No 1) 0.30 M

La efikoj de la U-boata milito (Nova Esperanto-Biblioteko No 2) 0.30 M

La granda mensogo. Traduko de la angla broŝuro „*Tsardom's part in the war*“ de E. D. Morel. (Nova Esperanto-Biblioteko No 3-4) 0.60 M

Krome estas haveblaj:

Dokumentoj pri la militeksplozo (Blanklibro de la germanimperia registaro) — Internacia Bulteno n-oj 17—24 1.60 M

Oni mendu ĉe la eldonejo

Friedrich Ellersiek, Wißmannstraße 46, Berlin S 59

ÖNB



+Z81795909